

La Progresanto

REDACTIE-
COMITE
G. P. DE BRUIN
G. J. DEGENKAMP
W. F. KRUIT

STUDIEBLAD VAN DE BOND
VAN ARBEIDERS-ESPERANTISTEN
IN HET GEBIED VAN DE NEDERLANDSE TAAL
f 1.75 per jaar; f 1.25 voor leden van F.L.E.
Postgiro 331133

H. KUYT
JAC. LEM JR.
H. VAN LIER
J. VAN SCHEEPEN
H. VELTHOEVE

REDACTIE EN ADM.: G. J. DEGENKAMP, ROELANTSTRAAT 4, AMSTERDAM-W.

ESENCO DE LITERATURO

G. Brugman
(Daŭriĝo)

Koncerne la klasifikon de la literaturo mi atentigas, ke nia multifaceta vivo estas rigardebla laŭ multaj diversaj vidpunktoj kaj manieroj, el kio rezultas same tiom da specoj de literaturaĵoj. Tamen ilia klasifiko ĉiam restas arbitra kaj tre relativa, ĉar tiuj specoj, same kiel la vivo esprimita en ili, formas ankaŭ ian tuton, ian ordon de interrilatantaj elementoj, kies limoj neniel estas ekzakte difineblaj, neniam estas absolutaj.

Jam tre ĝenerala ŝajne tute simpla divido de la literaturo en poezio kaj prozo, povas iafaje kaŭzi embarason, se pri iu verko oni devas decidi, al kiu fako ĝi apartenas. En poezio ne sufiĉas atenti la versmezuron; oni devas konsideri krome la enhavon kaj la stilon de la prijuĝata verko. Sed ankaŭ en prozo la valoro de verko dependas de enhavo kaj stilo; kaj ĉu do tamen la diferenco inter ambaŭ specoj konsistas sole en la versmezuro? Se, ekzemple, altnivelan prozon oni tradukas en korektajn versojn, ĉu oni tiam akiras altnivelan poezion? Mi supozas, ke neniu el vi tion kredas. Kaj prave, ĉar mia konkludo estis nur ŝajne logika. Ĝi baziĝis sur la falsa premiso, ke enhavo kaj stilo de prozo kaj poezio estas plene egalaj. Jam ne parolante pri la stilo, mi akcentas nun sole la evidentan malsamecon de la enhavo. En poezio oni esprimas kaj celas elvoki sentojn; kaj neniu provos verki poemon per malvarma, pure racia rezonado. La verkanto de prozo libere esprimas la tutan enhavon de sia spirito, ankaŭ sentojn, kvankam ĉi tiujn ĝenerale malpli forte ol en poezio.

Tamen ekzistas romanoj plenaj de poezio kaj „poemoj” tute sekaj, kaj tion mi celis dirante, ke la klasifiko de verko kelkfoje povas embarasi nin.

Por mi la plej interesa kategorio de la prozo estas la filozofia scienca literaturo, en kiu oni klopodas atingi tute fundan komprenon pri la esenco de la vivo. Tio okazas per senfina rezonado pri tezoj kaj kontraŭtezoj, starigitaj sur la bazo de spertitaj faktoj, aŭ kiel iuj filozofoj asertas tute sendepende de ia sperto apriorie el la racio mem. La pravo de ĉi tiu distingo ŝajnas al mi tre dubinda kaj neniel pruvebla, ĉar neniu homo povas ne kolekti spertojn. Male, dum nia tuta vivo nia mondo interna daŭre interefikas kun la mondo ekstera, kaj „pura” racio en tia senco sekve ne povas ekzisti.

Racio pura miaopinie povas esti nur la evoluinta penskapablo, kies procedoj rekte kondukas al luma kompreno en kontrasto kun primitivaj pensmanieroj kiuj persistas je superstiĉaj kaj metafizikaj kredoj.

Niaj pensoj devas fidele respeguli la ordon, kiu regas en la naturo. La plena konformeco inter ambaŭ ordoj, inter logiko kaj logos, nomiĝas kompreno.

Ĉi tie mi devas atentigi pri kutima distingo inter naturo kaj homo, tiel kvazaŭ la homo kaj ĉio, kio devenas de li, ne apartenus al la naturo. Laŭ tio ekzemple oni nomas la naciajn lingvojn naturaj kaj Esperanton nenatura, artefarita, tial ke la lasta estas kreita de homo kaj la unuaj iel originas rekte el la naturo aŭ el Dio. Kompreneble tia diferencigo estas absurda. La homo kun sia kulturo kiel ĉenero enviciĝas en la granda tuto de la aĵoj. (Finota)

POR KOMENCANTOJ

H. Kuijt.

Vertalingen zende men voor de 10e van de volgende maand aan het redactie-adres Roelantstraat 4, Amsterdam-W.

DE WIJZEN VAN HET WERKWOORD (Vervolg).

4. De gebiedende wijs (ordona modo).

Als men uitdrukking wil geven aan de wens, dat een handeling werkelijkheid wordt, bedient men zich van de gebiedende wijs. Dit kan men doen:

a. door een kort bevel: Kom! Ga! Zwiĝ! Leg het boek op tafel! Raak mij niet aan! enz.

Richt men zo'n bevel tot meer dan één persoon, dan zegt men:

Kom! Zwiĝt, Gaat! enz. Een werkwoord in deze wijs gaat in Esperanto uit op de letter *u*, ongeacht of men tot een of meerdere personen spreekt. *Venu! Iru! Silent! Metu la libron sur la tablon! Ne tuŝu min!*

b. op een milde, min of meer beleefde manier: Ik verlang, dat u komt. *Mi deziras, ke vi venu.* Ik verzoek u, dat u het boek op tafel legt. *Mi petas al vi, ke vi metu la libron sur la tablon.* Vooral bij het vertalen van laatstgenoemde vormen worden veel fouten gemaakt. De oorzaak hiervan is, dat men zich in het Nederlands meestal bedient van een der tijdsvormen van de aantonende wijs (zie de voorbeelden onder b.) of van het werkwoord *zouden*, welk laatste geval dan een voorwaardelijke wijs kan doen veronderstellen; bijv.: Ik verzocht hem, dat hij bij mij zou komen. Wij smeekten de dokter, dat hij de zieke zou helpen. Ook deze vormen vertaalt men in Esperanto met de gebiedende wijs. *Mi petis al li, ke li venu al mi. Ni petegis la kuraciston, ke li helpu la malsanulon.* Nog enkele voorbeelden: Ik wil, dat u alleen gaat. *Mi volas, ke vi iru sola.* Wij eisen, dat u ons helpt. *Ni postulas, ke vi helpu nin.* Ik raadde hem aan, dat hij duidelijk zou schrijven. *Mi konsilis al li, ke li skribu klare.* Ook de volgende zinnen vertaalt men in de gebiedende wijs: Het is wenselijk, dat zij vroeg naar bed gaat. *Estas dezirinde, ke ŝi true iru en la lito.* Het is nodig dat allen Esperanto leren. *Estas necese, ke ĉiuj lernu Esperanton.* Het is uw plicht, dat u medewerkt. *Estas via devo, ke vi kunlaboru.* Het is verboden, dat u op het gras loopt. *Estas malpermesite, ke vi iru sur la herbo.*

Al deze zinnen houden de wens in, dat een handeling werkelijkheid wordt. Dit is dan ook onze richtlijn bij het gebruik

van de gebiedende wijs. Het bezigen van deze wijs is niet strikt afhankelijk van een aantal woorden of uitdrukkingen, waarachter de gebiedende wijs zou moeten volgen, maar wel van het feit, of het eventueel tot stand komen van de handeling een gevolg is van het wenssen, verlangen, eisen aanraden enz. Een voorbeeld daarvan is de zin: Wij hopen, dat u op tijd komt. *Ni esperas, ke vi venu ĝustatempe.* Men mene nu niet, dat na het w.w. *hopen* altijd een gebiedende wijs komt. Dit is meestal niet het geval. Maar deze zin wordt tot iemand gericht met de bedoeling, aan te sporen tot op tijd komen. Maar in de zin: Ik hoop, dat hij morgen komt, is het eventuele komen geen gevolg van mijn hopen, dus hier vertaalt men: *Mi esperas, ke li venos morgaŭ.*

De gebiedende wijs wordt ook gebruikt na *por ke*, omdat ook hier een wens in ligt besloten. Bijv.: *Atentu, por ke vi ne faru erarojn. Ne iru sola en la arbaro, por ke vi ne perdu la vojon.*

Voorts kan men ook ten opzichte van zichzelf een wens uiten, waar men dan in het Nederlands het werkwoord *laten* gebruikt: Laat ik gaan. *Mi iru!* Laten wij rusten! *Ni ripozu!* Laten wij lezen! *Ni legu!*

Ter vertaling. Opgave 6.

Kom hier en breng papier en potlood mee. Ik geef er de voorkeur aan, dat u hier gaat zitten. Maak je niet ongerust, wij zijn voor donker thuis. Laat ik u iets dicteren: Het is nodig, dat wij veel studeren. Sta mij toe, dat ik vertrek. De jongen smeekte mij, dat ik hem niet zou straffen. Cursisten, weest altijd ijverig. Ik verzocht hem, dat hij vroeger zou komen. Geef de hond water, hij heeft dorst. De voorzitter spoorde de leden aan, dat zij veel propaganda zouden maken. Laten wij hopen, dat het morgen mooi weer is. Ga niet te laat weg, opdat u voor donker thuis bent. Het is wenselijk, dat u zeer veel leest. Morgen zullen wij gaan wandelen. Laten wij rusten.

Vertaling van opgave 4.

La lernanto atente¹⁾ legis la libron, kiun mi donis al li. La domo, en kiun²⁾ la viro iris, estas malnova kaj kaduka³⁾. Kiu ridas lasta⁴⁾, ridas plej boné. Tio⁵⁾, kion li faris, estis ne ĝusta⁶⁾. Per⁷⁾ tia plumo, kian vi donis al mi, mi ne povas skribi. Iun⁸⁾, kiu bezonas⁹⁾ helpon, oni ne preterpasu¹⁰⁾. La lernantoj, kies taskojn la instruisto kontrolis, estas tre diligentaj. Tiel¹¹⁾ strangan¹²⁾ libron, kiel¹³⁾ ĉi tiu, mi neniam legis. Ĉion¹⁴⁾, kion vi

vidas ĉi tie, mi akiris¹⁵⁾ per streĉa laborado¹⁶⁾.

1) Ook: *serioze*. 2) Niet: zonder richtings-N. 3) Wat te sterk is: *ruiniginta*. 4) Niet: *laste*; hoewel in „Proverbaro” de vertaling voorkomt met *laste*, is dit toch niet juist. Vergelijk: *Li unue* (ten eerste) *ploras*. *Li poste* (later) *kantas*. *Li laste* (ten laatste) *ridas*. *Johano ridas unua* (eerste zijnde). *Petro ridas lasta* (laatste zijnde). 5) Niet: *kion li faris, estis ne ĝusta*; alleen als het betrekkelijk voorn. woord in dezelfde naamval staat als het antecedent, mag *tio* worden weggelaten. Zie: La Pr. blz. 27. 6) Niet: *justa*; d.i. rechtvaardig. Bijv.: *La ŝtelisto estas juste punata*. 7) Niet: *kun*; d.i. met, in de betekenis van: in gezelschap van. 8) Niet: *iu*; de hoofdzin is: *Iun, . . . , oni ne preterpasu*. *Iun* is hier een rechtstreekse bepaling; men ontlede de zin eens. 9) Niet: *necesas*; d.i. nodig zijn, ekz.: *Internacia lingvo necesas (estas necesas)*; maar: *La homaro bezonas internacian lingvon*. 10) Ook: *preteriru*. Niet: *oni ne devas preterpasi*; men heeft hier met een wens of raad te doen, hoewel in de Nederl. zin *moeten* is gebruikt, is hier van een wer-

kelijk moeten geen sprake. 11) Ook: *tian, . . . , kia*; de Nederl. zin kan op twee manieren verklaard worden: *Tiel (tiom) strangan libron, kiel, . . . ; tiel* is een bijwoord en zegt iets van *stranga*. *Tian strangan libron, kia, . . . ; Tian* is een bijv. naamw. en zegt iets van *libron*. Vergelijk: *Tio estas bone pagita funkcio*. Dat is een goed betaalde functie. *Tio estas bona, pagita funkcio*. Dat is een goede, betaalde functie. 12) Niet: *fremdan*; vergelijk: *Li estas fremda* (onbekend, buitenlander) *viro*. *Li estas stranga* (eigenaardig, raar) *viro*. 13) Zie: 11. 14) Niet: *tio*; dit is een rechtstreekse bepaling. 15) Niet: *ricevis*; d.i. ontvangen zonder dat er moeite voor gedaan wordt. 16) Ook: *per laboregado, per diligenta, fervora, forta laborado*. Niet: *per obstine labori*; het voorzetsel *per* gebruike men niet voor een onbepaalde wijs; dit is alleen mogelijk na *anstataŭ* en *por*, welke voorzetsels dan dienst doen als voegwoord.

E.R.M. 8, G.A. en R 9, Sen nomo 6, C. v. S en R. 7, P.W.W. en G. 8, A.A.D. en Z. 7, Astor 9, L.P. en R. 8, G.H. de N. 7.

Dem.: Kion signifas „spiti” kaj „spitema”?

Resp.: „Spiti” estas verba derivaĵo de „spite” (in weerwil van). Ĝia signifo do estas „handelen in weerwil van”, kaj ĝenerale ĝi estas tradukebla per „weerstreven, trotseren, dwarsbomen, weerstaan, uitdagen, (uit)tarten, zich blootstellen aan”. Oni ne intermiksi „spiti” kun la parencaj verboj „rezisti, provoki, defii”.

„Spitema” = havi la emon spiti, do: „weerstrevend” k.t.p.

Dem.: Kiel oni buŝe aŭdigu diferencon inter:

1. $3 + 5/8 \times 464 = 293$ (tri kaj kvin okonoj de);

2. $3\ 5/8 \times 464 = 1682$ (tri kaj kvin okonoj de)?

Resp.: Laŭ du manieroj:

1. anstataŭ „kaj” oni uzu „plus”: tri plus kvin okonoj;

2. anstataŭ „kaj” oni uzu „kun”: tri kun kvin okonoj.

Uzo de „kun” estas nekutima, sed sufiĉe klara.

Kaj due:

1. tamen uzante „kaj”, sed akcente kaj skande;

2. senakcente.

Dem.: Kiel ni traduku „waterstoker”?

Resp.: Se vi celas per tiu vorto „wateren vuurstoker”, ni tradukus „butikisto de varma akvo kaj hejtajoj”. Traduko unuvorta ne estas rekomendinda, ĉar ni ne scias, ĉu tiaj negocistoj estas konataj en aliaj landoj. Se oni kelkfoje en unu teksto bezonas la tradukon, ni konsilas uzi unuafloje la klarigon kaj poste simple „hejtajisto”.

Dem.: Kio estas taŭga traduko por „prinsesseboon”?

Resp.: Ĝenerale sufiĉas „fazeolo”. Se diferencigo necesas, ni rekomendas: prinsesse-, heren-, sperzie- suikerboon = ŝvela fazeolo; snijboon = plata fazeolo.

Dem.: Kiel ni traduku: „Ik denk nog steeds aan de lachende jongen van gisteren” (ridanta aŭ ridinta?).

Resp.: Oni povas traduki trimaniere:

1. Mi memoras ankoraŭ (ofte) pri la hieraŭa ridanta knabo. Temas pri knabo ridanta, ne ridinta (= gelachen hebbende); „hieraŭa” difinas „knabo”, ne la tempon de „ridi”.

2. pri la hieraŭ ridinta knabo = la knabo, kiu hieraŭ ridis; nun „hieraŭ” difinas la tempon de „ridi”.

3. pri la ridanta knabo de hieraŭ. La 3a traduko estas la plej flua kaj klara.

DE KOMENCANTO AL PROGRESANTO

J. Lém.

Opgave 7. Vertaal in Esperanto en leer de woorden, die u niet kent.

EEN BEZOEK AAN DE AMSTERDAMSE DIERENTUIN.

(Vervolg).

Het menselijk verstand (*prudento*) vraagt naar (het) „hoe” en „waarom”. De mens kan redeneren, gevolgtrekkingen maken (*fari konkludojn*). Als wij handelen, kunnen wij ons afvragen: „wat zal er gebeuren, tengevolge van (*sekve de*) ons handelen?” Wij kunnen ons afvragen: „hoe bereiken wij het gemakkelijkst en zekerst ons doel?” Bij het dier ontbreekt dit vermogen (*kapablo*). Het redeneert niet; het handelt volgens zijn aangeboren aandrift (*denaska impulso, naturinstigo*) en naar de indrukken van het ogenblik, op de een of andere wijze, omdat het niet op een andere wijze handelen kan. Het dier is van nature (*laŭnature*) noch goedaardig (*bonkaraktera*), noch wreed of vals (*perfida*). Het is niet verantwoordelijk (*respondeca*) voor (*pri*) zijn daden (*agoj*). Dieren zijn onschuldig. Alleen de mens, wiens verstand hem in staat stelt de gevolgen (*efikoj, konsekvencoj*) van zijn daden vooraf te kunnen berekenen (*povi antaŭkalkuli*), kan goed- of kwaadaardig zijn.

Dieren zijn echter geen automaten. Zij bezitten een geheugen. Velen zelfs een zeer goed geheugen. Tot op zekere hoogte (*iagrade*) kunnen zij iets leren, echter niet volgens theoretische regels. Voor hen geldt slechts (*al ili nur aplikigās*): „door schade en schande wordt men wijs” (*post domaĝo venas saĝo*). Door ondervinding (*spertante*) leren zij onderscheiden of iets gevaarlijk is of niet, of iets aangenaam is of niet en ook wat gij verlangt, dat zij zullen doen of laten (*ke ili faru aŭ ne faru*). Hebt gij uw hond niet geleerd een pootje te geven (*prezenti la piedon*) of iets, dat hem met de linkerhand wordt aangeboden, niet aan te raken? Dieren kunnen sympathie en antipathie gevoelen. Enige jaren geleden leefde in „Artis” een tijgerin, die zich zeer vriendschappelijk jegens (*rilate al*) mij gedroeg. Wanneer zij mij zag aankomen (*alproksimiĝanta*), verschool zij zich achter een in de kooi liggende boomstam en als ik de kooi had bereikt, sprong zij plotseling naar voren en gaf kopjes (*kapkaresi*) aan de tralies (*kradstangoj*), tegelijkertijd haar vreugde kenbaar makend door een zacht gegrom

(*grumblado*).

Wanneer ik haar met mijn wandelstok streelde, sloot zij behaaglijk (*plaĉe*) de ogen, evenals een kat, die men aanhaalt. Wanneer zij zich in de achterkooi (*postkaĝo*) bevond, behoefde ik haar slechts te roepen en zij verscheen dadelijk. Tussen tientallen mensen, die voor de kooi stonden (*starantaj*), herkende zij mij, zelfs indien ik gedurende enige wintermaanden de tuin niet had bezocht. Dieren kunnen zeer lief (*ĉarmaj*), maar ook onberekenbaar gevaarlijk zijn. Een plotselinge beweging of een onverwacht geluid kan hun schrik aanjagen (*ektimiĝi*) en, daar zij niet redeneren, in hen een afwerende (*defenda*) reactie opwekken. Uw hond, die veel van u houdt, zal u misschien bijten, als u tracht hem uit het water te redden. Hij begrijpt uw bedoeling (*intenco*) niet en voelt zich door uw greep in gevaar. Hij is noch on dankbaar, noch vals, maar... hij is geen mens, hij kan immers niet „redeneren”. Maar genoeg daarover.

(Wordt vervolgd).

Vertaling van opgave 6.

VIZITO AL LA AMSTERDAMA ZOOLOGIA ĜARDENO.

La zoologia ĝardeno estas unu el la vindindaĵoj de Amsterdam. Oni konas ĝin sub (per) la nomo „Artis”. „Artis” estas mallongigo de la latina devizo „Natura Artis Magistra”; kiu signifas: „La Naturo estas la Instruisto de la Arto”. Gi estas belega ĝardeno, kaj kiu iam vizitis ĝin en la printempo, kiam la juna, freŝa foliaro kaj la multkoloraj floroj donas al ĝi la aspekton de paradizo, ĉiam kun ĝojo (ĝoje) rememoras tiun ĉi viziton. Post la enirejo troviĝas je la dekstra flanko la t.n. „porinfana bieno”. Oni povas sengene eniri. Precipe la infanoj tre ŝatas viziti tiun „bienon”. Enirinte, ili tuj sin trovas meze inter multaj bestoj. Azeno, bovidoj, kaproj, kaprinoj, porkinoj kun idoj, ŝafoj, anasoj, anseroj, kunikloj granda hundo, ili ĉiuj estas tre malsovaĝaj kaj lasas sin karesi. Avide ili etendas siajn kolojn por preni la nutraĵon, kiu estas prezentata al ili (kiun vi prezentas al ili). Majeste staras la cikonio ĉe (apud) la bordo de la lageto, en kiu naĝas belegaj cignoj. Legom- kaj florbudoj, plenaj de papilioj, burdoj kaj abelroj petas nian atenton. Sed nun ni forlasu la porinfanan bienon. Nia celo ne estu rapide preterpasi la

POR PROGRESANTOJ

J. van Scheepen.

Vertalingen zende men vóór de 10e van de volgende maand aan het redactie-adres, Roelantstraat 4, Amsterdam-W.

Opgave 8. Vertaal in Esperanto:

Het is eigenlijk verwonderlijk, dat het in deze tijd van sterk toenemend internationaal verkeer nog nodig is, om het probleem van een universele hulptaal aan de orde te stellen. De mens, die zich een meester toont in het overwinnen van technische moeilijkheden en die met name de verkeersproblemen met verbijsterend gemak weet op te lossen, diezelfde mens staat schijnbaar hulpeloos tegenover het allergrootste verkeersobstakel, dat bestaat in de veelheid en de verscheidenheid van de nationale talen. De tegenwoordige situatie immers, waarbij van ieder, die zich internationaal wil bewegen, kennis van de voornaamste talen gevergd wordt, kan bezwaarlijk als ideaal gelden. Terwijl de moderne vervoermiddelen geheel op maximale snelheid en doelmatigheid berekend zijn, verwaarloost men het verkeersmiddel bij uitstek, dat taal heet. Men grijpt elke mogelijkheid aan om bij het internationale verkeer tijd en geld te sparen, maar men denkt er niet aan, om deze economie ook toe te passen op de taal, die tenslotte alle contact met andere personen mogelijk moet maken. Dr. W. Manders.

Vertaling van opgave 5.

La ĉiujare revenanta internacia kongreso de S.A.T.¹⁾ estas speciale²⁾ por la laboristaj esperantistoj grava okaz(aj)o. Ne nur pro tio, ke³⁾ oni renkontas siajn konatojn⁴⁾ kaj korespondantojn kaj akiras⁵⁾ novajn konatiĝojn⁶⁾, sed ankaŭ precipe, ĉar oni klopodas⁷⁾ solvi en kamarad(ec)a sfero la malfacil(aj)ojn kaj problemojn de la asocio.

Tamen tia kongreso prezentas⁸⁾ ankoraŭ alian okazon por kontribui al⁹⁾ la kleri-

gado¹⁰⁾ kaj la kamarad(ec)aj rilatoj inter¹¹⁾ la partoprenantoj kaj iliaj¹²⁾ gastigantoj. Ĉar tiuj¹³⁾, kiuj dum¹⁴⁾ la kongressemajno ricevas lokon en laborista familio, havos belegan okazon por ekoni la nederlandan loĝejon¹⁵⁾ por laboristoj, ilian familian vivon, iliajn morojn¹⁶⁾.

Multon¹⁷⁾ oni¹⁸⁾ povos doni al ili per¹⁹⁾ minimuma²⁰⁾ peno kaj por tio oni ricevos minimume same multe. Ĉar niaj eksterlandaj gastoj estos²¹⁾ por ni pretaj rakonti al ni siajn situaciojn, prezenti²²⁾ al ni siajn malfacilojn. Ni povos kompari kaj atentigi ilin pri la diferencoj kaj similaĵoj²³⁾.

Tiel konsiderante tion²⁴⁾, oni rimarkos, ke la gastoj instruas²⁵⁾ al ni dum unu²⁶⁾ semajno pli ol la ĵurnaloj povos doni al ni dum tuta jaro.

1) Ook: *la internacia kongreso de S.A.T., kiu ĉiujare revenas, okazas.* 2) Ook: *precipe.* 3) Ook: *ĉar.* 4) Niet: *konatulojn.* „Ato” kaj „ulo” zijn in dit geval pleonasmen. 5) Ook: *ekhavas.* 6) Ook: *konatojn*, in welk geval men echter hetzelfde woord tweemaal in de zin gebruikt. 7) Ook: *penas.* 8) Ook: *donas.* 9) *Pligrandigi. . . n.* 10) Ook: *evoluo.* 11) Duidelijker dan: *de.* 12) Onderwerp van de zin, ook verborgen in de onbepaalde wijs van „kontribui”, is: *tia kongreso.* Dus „siaz” is fout. 13) Niet: *ili.* 14) Niet: *en.* Dit betekent: in de loop van. 15) Ook: *loĝlokon.* 16) Ook: *kutimoj.* 17) Ook: *multe.* 18) Ook: *Multo povos esti donata, multe povos esti donate.* De bedrijvende vorm is echter duidelijker en vloeiender. 19) „Kun” wordt hier ook wel gebezigd, doch dit voorzetsel is hier niet zo goed op zijn plaats. 20) Ook: *malplej multe da.* 21) Niet: *staros.* 22) Beter dan: *montri.* 23) Ook: *analogiaĵoj.* 24) Ook: *vidante.* Niet: *tiel konsiderite*, want dit bijwoordelijk deelwoord heeft dan tot onderwerp „oni” uit de hoofdzin. 25) Niet: *lerni.* Ook: *lernigi.* 26) Om de nadruk op „een” te leggen wordt dit als een telwoord vertaald.

Dem.: Kiel ni traduku: „De spreker wakte hen op, de afdeling te steunen”? Dubo ekzistas pri la tempo de „opwekken”.

Resp.: Ne miru, ke -anto kaj -is laŭtempe ne akordiĝas. La tempon de la participoj oni konsideru laŭ la tempo,

diversajn bestrestejojn, sed klopodi iom kompreni pri la konduto kaj la vivmaniero de la bestoj. Se ni atente observas la bestojn kaj iliajn agmanierojn, ni povas multe lerni kaj kompreni. Antaŭ

pri kiu oni parolas, ne laŭ la tempo, en kiu oni parolas. Kvankam la persono estas nun parolinto, li estis hieraŭ parolanto. Li instigis parolante; do: La parolanto instigis ilin subteni la sekcion. En tiaj frazoj oni ne bezonas konsideri rektan aŭ nerektan parolon.

ĉio ni konsciu, ke bestoj ne estas homoj en bestaj haŭtoj. (Daŭrigota). Bonvolu korekti en la traduko de tasko 5a sur paĝo 37a, la lastan vorton de la 8a linio de malsupre: „Fine” d.e. „Frue”.

DE WERKWOORDEN

VERHOUDING TOT ONDERWERP EN VOORWERP.

(Vervolg)

Als regel leert men ook, dat een bijwoord een onderwerpszin bepaalt: *estas laŭdinde*, ke la laboristoj komprenu la *utilon de Esperanto*. Maar logisch moest ook dit bijwoord, *laŭdinde*, een bijvoeglijk naamwoord zijn. Men kan de onderwerpszin immers vervangen door *tio*: *estas laŭdinda tio*; en ook vragen: *kio estas laŭdinda?*

Maar het is nu eenmaal regel geworden in zulke gevallen een bijwoord te gebruiken; en zelfs de meest scrupuleuse grammatici zullen dat niet meer kunnen veranderen. In den beginne heeft Zamenhof in deze gevallen meer dan eens ook een bijvoeglijk naamwoord gebezigd. Later heeft hij — naar men meent op aanraden van de Beaufont — de bijwoordelijke vorm doelmatiger gevonden.

Toch is er een zo'n geval, waarin het gebruik van een bijwoord aanleiding tot misverstand kan geven, n.l., als zo'n bijwoord — eigenlijk bijvoeglijk naamwoord — de rol van bepaling van gesteldheid vervult, b.v. in: *ni opinias ĝuste, ke li agis tiel*. Is dit: *wij achten het juist, dat hij zo gehandeld heeft?* Dus dat hij juist handelde? Of: *juist achten wij het, dat hij zo handelde?* Dus dat ons achten juist was? In het tweede geval is *ĝuste* correct. Maar meestal wordt het eerste bedoeld, en dan zou *ĝusta* beter op z'n plaats zijn, omdat *ĝusta* dan een bepaling van gesteldheid is, behorende bij de voorwerpszin *ke li agis tiel*. Kabe heeft dit zeer wel ingezien, zodat hij op enkele plaatsen in zijn vertalingen in zulke zinnen dan ook een bijvoeglijk naamwoord heeft gebruikt. Ook bij Zamenhof en sommige latere auteurs vinden wij hier een bijvoeglijk

naamwoord. Consequent vinden wij het bijvoeglijk naamwoord toegepast in „La Perfido” van Kruit. Zelf willen wij liever geen bepaald standpunt innemen; wij erkennen de onjuistheid van het bijwoord in dit geval, evenals in de hiervóór besproken gevallen. Consequent terugkeer tot het bijwoord is niet meer mogelijk; en voor inconsequente toepassing van een bijwoord in het ene, en een bijvoeglijk naamwoord in het andere geval gevoelen wij niet veel.

2. Een werkwoord als voorwerp.

Behalve als onderwerp, kan de onbepaalde wijs ook als voorwerp voorkomen. In het taalgebruik worden deze gevallen eenvoudig niet meer opgemerkt, omdat zo'n onbepaalde wijs altijd op een vervoegd werkwoord volgt, waarmee het tezamen meestal als gezegde wordt opgevat.

Zinnen, waarin de onbepaalde wijs logisch als voorwerp dienst doet, zijn o.m.:

Li esperis sukcesi. Mi forgesis kunporti la libron. Ni konsilas veni ĝustatempe. Mi konfesas esti erarinta. Oni decidis pagi. Li instruis al la infanoj konduti pli bone. Permesu al mi foriri! Kial vi rifuzis helpi? La infano lernas paroli. Li scias oratori. Ŝi preferis dormi.

Dat de onbepaalde wijs in al deze zinnetjes, behalve als deel van het gezegde, ook als voorwerp beschouwd kan worden, blijkt hieruit, dat men die wijs vervangen kan door een werkelijk voorwerp of een voorwerpszin: *Li esperis sukceson. Li esperis, ke li sukcesos. Li esperis tion*. En in de vragende vorm moet men zelfs een werkelijk voorwerp bezigen: *Kion li esperis?*

Overigens is het van weinig belang, hoe men die onbepaalde wijs ook opvat, omdat dit toch van geen invloed is op het gebruik van andere zinsdelen.

(Wordt vervolgd).

Dem.: Ĉu la vorto „jena” postulas artikolon aŭ ne? Mi trovis la jenajn frazojn kun kaj sen artikolo: „Li transdonas la gvidon de la kongreso al k-do v. H., kiu malfermas ĝin per jena parolado” (L.E.). „Mi petas vian konsilon pri la partecipo kaj verbo en la jenaj frazoj” (L.P.). „Li demandis al li la jenajn tri demandojn” (Esp. Krest.). „Pli mallonga vojo estas jena” (P.V.). „Mi volas al vi komuniki la jenon” (P.V.).

Resp. „Jena” estas adjektivo, sed ankaŭ pronomo, same kiel „mia, via” k.s. kaj „alia”. Pro ilia pronomo signifo iuj grammatikistoj kutime ne uzas artikolon.

Aliaj, tamen, opinias, ke la artikolo estas utila, ĉar sen artikolo tiuj vortoj ne klare difinas specialan personon aŭ aferon. Vidu la diferencon inter la jenaj frazoj:

La afero estas jena (als volgt).
La afero estas la jena (de volgende).
Tiu libro estas mia (van mij).
Tiu libro estas la mia (het mijne).
Unu respondas, alia ne (een ander).
Unu respondas, la alia ne (de ander).

Al uzo de l' artikolo en tiaj kaj similaj frazoj ni sietempe dediĉos pritrakton, ĉar ankaŭ tiu afero apartenas al la lingvaj problemoj antaŭe menciitaj.

NOMOJ DE KELKAJ PLEJ OFTAJ NEDERLANDAJ BIRDOJ

laŭ la oficiala listo de la nederlandaj nomoj kun la hodiaŭaj latinaj nomoj kaj kun proponitaj Esperantaj nomoj.

G. F. Makkink.

Post la Esperanta nomo parenteze troviĝas sinsekve la aŭtorliteroj pri genra kaj pri specia nomoj.

S = Stojan („Ornithologia Vortaro“, 1911a)

M = Makkink

SM = Stojan, iom ŝanĝita de Makkink

UV = „Universala Vortaro“

PV = „Plena Vortaro“ (1930a)

W = Wüster („Esp. Enc.“)

B = Stop-Bowitz

La nomojn ni metis ne en alfabetan sinsekvo, sed ordigitaj laŭ parenceco, kio faciligas komparon kun parencaj specoj.

Roodkeelduiker — *Colymbus stellatus* — ruĝgorĝa kolimbo (S—UV)

Fuut — *Podiceps cristatus* — grebo (S—S)

Geoorde fuut — *Podiceps nigricollis* — nigrakola grebo (S—S)

Dodaars — *Podiceps ruficollis* — malgranda grebo (S—S)

Jan van Gent — *Sula bassana* — bass-a sulo (M—S)

Aalsolver — *Phalacrocorax carbo* — granda kormorano (S—PV)

Blauwe reiger — *Ardea cinerea* — cindra ardeo (SM—UV)

Purperreiger — *Ardea purpurea* — purpura ardeo (SM—UV)

Woudaapje — *Ixobrychus minutus* — malgranda botaŭro (S—PV)

Roerdomp — *Botaurus stellaris* — granda botaŭro (S—PV)

Ooievaar — *Ciconia ciconia* — blanka cikonio (S—UV)

Lepelaar — *Platalea leucorodia* — plataleo (M)

Wilde zwaan — *Cygnus cygnus* — kantocigno (S—UV)

Kleine zwaan — *Cygnus bewicki* — malgranda cigno (S—UV)

Knobbelzwaan — *Cygnus olor* — muta cigno (S—UV)

Grauwe gans — *Anser anser* — griza ansero (SM—UV)

Rietgans — *Anser fabalis* — faba ansero (B—UV)

Kolgans — *Anser albifrons* — blankfrunta ansero (S—UV)

Brandgans — *Branta leucopsis* — monaĥinansero (S—UV)

Rotgans — *Branta bernicula* — nigra ansero (S—UV)

Bergeend — *Tadorna tadorna* — tadorno (M)

Wilde eend — *Anas platyrhynchos* — platbeka anaso (M—UV)

Wintertaling — *Anas crecca* — malgranda anaso (S—UV)

Zomertaling — *Anas querquedula* — marĉa anaso (S—UV)

Pijlstaart — *Anas acuta* — pintvosta anaso (S—UV)

Smient — *Anas penelope* — fajfanaso (UV)

Slobeend — *Spatula clypeata* — kuleranaso (M—UV)

Tafeleend — *Aythya ferina* — ruĝkapa anaso (SM—UV)

Kuifeend — *Aythya fuligula* — hupanaso, fuligulo (SM—UV) (PV)

Toppereend — *Aythya marila* — mara merganaso (S—S)

Brilduiker — *Bucephala clangula* — orokula anaso (S—UV)

Zwarte zee-eend — *Melanitta nigra* — nigra maranaso (M—M)

Eidereend — *Somateria mollissima* — molanaso (UV)

Grote zaagbek — *Mergus merganser* — granda merĝo (S—B)

Middelste zaagbek — *Mergus serrator* — segilbeka merĝo (B—B)

Nonnetje — *Mergus albellus* — blanka merĝo (S—B)

Bruine kiekendief — *Circus aeruginosus* — marĉa kirko (S—W)

Asgrauwe kiekendief — *Circus pygargus* — cindra kirko (SM—W)

Havik — *Accipiter gentilis* — akcipitro (UV)

Sperwer — *Accipiter nisus* — nizo (PV)

Wespendief — *Pernis apivorus* — vespo-buteo (S)

Buizerd — *Buteo buteo* — buteo (PV)

Ruigpootbuizerd — *Buteo lagopus* — vilkrura buteo (S—PV)

Slechtvalk — *Falco peregrinus* — pilgrima falko (S—UV)

Boomvalk — *Falco subbuteo* — alaŭdfalko (S—UV)

Torenvalk — *Falco tinnunculus* — turfalko (M—UV)

Korhoen — *Lyrurus tetrix* — tetro (UV)

Patrijs — *Perdix perdix* — perdriko (UV)

Kwartel — *Coturnix coturnix* — koturno (UV)

Fazant — *Phasianus colchicus* — kaŭkaza fazano (S—UV)

Kraanvogel — *Megalornis grus* — gruo (UV)

ANKORAŬ PRI „ĈU NE?”

En la marta L.P. k-do v. Scheepen kondamnata la vorton „ne” en la frazo. „Ĉu vi ne deziras ekbruligi cigaron?” Lia aserto, ke oni celas efektivan bruligon, estas ĝusta, sed ne lia konkludo, ke pro tio ni ne rajtas uzi neon. Ni juĝu bone! Unue ni povas simple konstati iun fakton, kaj tion ni esprimas jene: (1) Vi deziras ekbruligi cigaron. Sed tio ne estas konforma al la celo de la donita frazo.

Due ni povas konstati iun negativan fakton: (2) Vi ne deziras ekbruligi cigaron. Ankaŭ tiu frazo ne estas laŭcela.

Trie ni povas esprimi nian dubon, kaj tiuokaze ni uzas la konjunkcion „ĉu”: (3) Ĉu vi deziras ekbruligi cigaron? La respondo povas esti jesa kaj nea. Do: ni dubas pri la deziro, estas necertaj pri ĝi. Kvare ni povas esprimi nian dubon pri negativa fakto jene: (4) Ĉu vi ne deziras ekbruligi cigaron? En tiu okazo ni dubas la nedeziron kaj do preskaŭ baras la vojon al nea respondo.

Konklude: la frazo de v. Sch. estas bona, sed ankaŭ la kritikita, kaj ni povas eĉ variigi ĝin per du aliaj:

1. Ĉu vi dezirus ekbruligi cigaron? 2. Ĉu vi ne dezirus ekbruligi cigaron?

C. Bruins.

(Iom koncizigita pro nesufiĉa spaco. Red.)

K-do Bruins rezonas, ke oni povas esprimi dubon koncerne la demandotan aferon: „Ĉu vi deziras ekbruligi cigaron?” Do, oni dubas pri la deziro. Krome oni povas esprimi dubon koncerne negativan fakton: „Ĉu vi ne deziras ekbruligi cigaron?” Do, oni dubas pri la neo de la deziro.

La unua frazo estas simpla demando, kies respondo oni ne scias, eble nur supozas. Preskaŭ neniam ĝi esprimas dubon. La respondo estas „jes” aŭ „ne”. Nur en la lasta kazo oni esprimas sian miron per la frazo: „Ĉu vi ne deziras?” (Mi supozis, ke jes!)

Mi konsentas, ke iafaje la negativa demando povas esti aplikata, ekz., se mi antaŭe direktas demandon al iu: „Ĉu vi deziras naĝi?” Post nea respondo mi direktas la demandon al dua persono: „Ĉu ankaŭ vi ne deziras naĝi?” Nur en tiuj malmultaj kazoj, en kiuj oni antaŭe dubas pri la neo, oni povas senskrupule meti la demandon en la negativan formon.

J. v. Scheepen.

APREZI.

En L.P. pĝ. 28a s-ro W. F. Kruit uzis la vorton *aprezi*, pri kiu vorto mi ne konsentas. Ĝia historio estas kurioza: unue oni komencis misuzi la vorton *ŝati*, kiu laŭ la difino en L.R havas tre klaran signifon; kaj due, forgesinte la ĝustan signifon de *ŝati*, oni serĉis novan radikon por tiu signifo kaj enkondukis la anglo-francan *aprezi*. Sed por anglo tiu vorto pensigas pri *appraise* = *taksi* kaj estas miskompreniga. Do poste oni proponis *apreci!* La ĝusta solvo estas *ŝati*, laŭ la zamenhofa modelo.

M. C. Butler.

RESPONDOJ AL ASTOR

„Desegi” („Fontamara”, 50—23) = afzagen (oni trovis desegitaj ĉiujn vitojn = men vond alle wijnstokken afgezaagd). „Ariko” (L.M. 3/4, 48) = supozeble neologismo por forte fluanta rivereto. „Bekeŝo” (L.M. 3/4, 48) = jako kun galonoj (tressen). „Forlana-danco” (L.M. 3/4, 48) = vigla danco kun takto 6/4 aŭ 6/8. „Trecento” (L.M. 3/4, 48), neologismo, kies signifon ni bedaŭre ne povis eltrovi.

Dem.: Ĉu „kontraŭ” estas uzebla en la frazo „li staris kontraŭ la ĝardena muro”?

Resp.: En tiu frazo „kontraŭ” ne enhavas la kutiman senco de forto, aktiveco aŭ kontrasto; ĝi tamen estas la sole ĝusta vorto. „Sur” ne taŭgas, ĉar en „sur” oni sentas, ke la persono aŭ objekto estas iel fiksita sur objekto aŭ staras sur ĝi, ekz.: pentraĵo sur muro, muŝo sur muro.

Waterral — Rallus aquaticus — akvoralo (SM)
Porseleinhoen — Porzana porzana — makulita porzano (S—M)
Kwartelkoning — Crex crex — herbejaralo (M—M)
Waterhoen — Gallinula chloropus — verdkrura galinulo (S—PV)
Meerkoet — Fulica atra — nigra fuliko (S—PV)
Scholekster — Haematopus ostralegus — hematopo (M)

Goudpluvier — Charadrius apricarius — orpluvio (SM—S)
Bontbekpluvier — Charadrius hiaticula — koluma pluvio (S—SM)
Strandpluvier — Charadrius alexandrinus — marborda pluvio (S—SM)
Kievit — Vanellus vanellus — vanelo (PV)
Zilverpluvier — Squatarola squatarola — griza pluvio (S—S)
Steenloper — Arenaria interpres — ŝtonturnulo (M)
(Daurigota).

